

# Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, OKTOBRO 2009, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@bigpond.com

Legeblas ankaŭ surrete: [www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org)

## *La kreiĝo de la Hundo*

*La unuan tagon la Eternulo kreis la Hundon.*

*La duan tagon la Eternulo kreis la Homon, por ke tiu servu al la Hundo anstataŭ al Dio.*

*La trian tagon la Eternulo kreis ĉiujn aliajn bestojn, por ke tiuj servu - kiel manĝaĵo - al la Hundo.*

*La kvaran tagon la Eternulo kreis la laboregon, por ke la Homo laboregu por la bonfarto de la Hundo.*

*La kvinan tagon la Eternulo kreis la tenispilkon, por ke la Hundo havu ion por alporti, se ĝi tion deziras.*

*La sesan tagon la Eternulo kreis la bestkuraciston, por la sano de la Hundo kaj la malriĉiĝo de la Homo.*

*La sepan tagon la Eternulo estis laca kaj deziris ripozadi, sed Li devis promeniĝi la Hundon.*

## **Bedaŭrinde forpasis Jorge Mosonyi**

La 26an de aŭgusto je la 22a horo pro trafika akcidento forpasis en Karakaso la konata lingvisto, aktivulo por indiĝenaj lingvoj kaj esperantisto Jorge Mosonyi, prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio.

Jorge Carlos Mosonyi naskiĝis en Hungarujo la 7an de februaro 1947. Li transloĝiĝis al Venezuelo kiel infaneto.

Esperanton li lernis aŭtodidakte en 1973, kaj de tiam li estis membro de Venezuela Esperanto-Asocio. Plurajn fojojn li partoprenis prelegojn pri Esperanto kaj multajn fojojn li estis prezidanto de VEA.

Li tradukis multajn fabelojn de indiĝenaj venezuelaj popoloj kaj dum multaj jaroj laboris pri indiĝenaj lingvoj en Venezuelo.

*El Libera Folio*

*Eniras apotekon du knaboj. Post ioma rondirado ili fine prenas skatoleton da tamponoj. Ĉe la pagejo la viro demandas la pli aĝan knabon: "Filĉjo, kiom aĝa vi estas?"*

*"Ok", respondas la knabo.*

*Daŭrigis la viro: "Ĉu vi scias por kio oni uzas ĉi tiujn?"*

*Respondis la knabo: "Ne precize, sed ili ne estas por mi. Ili estas por li. Li estas mia frato. Lia nomo estas Huberto. Li aĝas nur kvar jarojn. Ni vidis en la televido, ke se oni uzas tiujn, oni baldaŭ povos naĝi, ludadi tenison kaj eĉ bicikladi. Ĝuste nun li ne povas fari tion!"*

### **Gravaj Esperanto-eventoj:**

**Dimanĉon la 27an de septembro je la 14a horo okazos floraranĝado en la belega hejmo de Katja kaj Trevor.**

**Merkredon la 7an de oktobro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.**

**Sabaton la 24an de oktobro okazos la jam populara kantofesto ĉe Indrani.**

**Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.**

**Sabaton la 7an de novembro, ni posttagmezumos ĉe Trevor. De la 27a ĝis la 30a de novembro AEA okazigos sian kongreson en Kanbero.**

**Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.**

**Dimanĉon la 13an de decembro, ĉe Indrani, ni festos la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.**

**La AEA-somerkursaro okazos en Sidnejo de la 10a ĝis la 25a de januaro 2010.**

**La Novzelanda Kongreso okazos en Velintono de la 26a de januaro 2010.**

**La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.**

**Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso okazos en Adelajdo. Kiel sciante, la unua AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911.**

Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!

*Diris la direktoro al sia sekretariino: "Kiu kredigis al vi, ke vi rajtas fari kion ajn, nur ĉar mi kisis vin du aŭ tri fojojn?"*  
*Respondis la sekretariino: "Mia advokato!"*

## Margaret Elyena Furness

intervjuita de Katja Steele

Margaret estas denaska adelajdano, nun loĝanta en domo kun granda ĝardeno apud Mount Barker. Ŝi naskiĝis la 16an de septembro 1951.

**K:** Verŝajne multaj esperantistoj scias, ke vi, laŭ profesio, estas kuracisto. Ĉu vi sekvis familian tradicion?

**M:** Mia patro estis piloto, sed kiam mi estis 7-jara, li ekstudis medicinon. Ĉar lian studentan amikaron decidis iĝi "studento de diplomitiĝis de la Universitato de Adelajdo poste ricevis plian tre plaĉis al mi havi ĉirkaŭ mi, mi jam tiam medicino". Mi medicina fako de la en 1974 (MB, BS) kaj diplomon (Dip Obs RANZOG). En 1981 mi iĝis radiologo (FRANZ, Fellow of the Royal Australian & NZ College of Radiologists) kaj pli specialiĝis pri ultrason-diagnozado (DDU) en 1984. Tiam mi estis jam 33-jara kaj rifuzis fari plian ekzamenon.



**K:** En kiuj lokoj vi laboris?

**M:** Unue en Flinders Medical Centre, post tio kiel direktoro de la radiologia fako de la Hospitalo Queen Victoria (1984-1995), kaj fine en la Hospitalo por Virinoj kaj Infanoj kiel ĉefo de la "Perinatal imaging" (1995-2004) – ĉiuj en Adelajdo. En 2004, por protesti kontraŭ la velkado de la publikaj hospitaloj, mi frue emeritiĝis. Nun mi scias, ke mi faris tion tro frue, sed tiam ĝi estis la sola tolerebla solvo. Neplentempe mi jam reiris al la laboro por unu kaj duona jaroj, origine por anstataŭi la feriantajn kolegojn. Pri mia fako mi publikigis plurajn fakajn artikolojn en diversaj anglalingvaj sciencaj ĵurnaloj.

**K: Kiel komenciĝis via rilato al Esperanto?**

**M:** Mi estis 16-jara kiam mi lernis la lingvon memstare el la lernolibro *Teach Yourself Esperanto*. La kialo estis mia junulina memfido: ĉar mi kapablis lerni la francan, mi eklernu ankaŭ iun alian lingvon. Sed mi forlasis Esperanton dum miaj medicinaj studjaroj, poste mi reesperantistiĝis kaj ekstudis plurfoje, sed revenis al la movado, kiam Max Wearing aranĝis Esperanto-kurson en Adelajdo en 1986? Mia tiam instruisto estis Trevor Steele.



**K: Kiujn aliajn fontojn de via Esperantisteco vi mencias?**

**M:** Sekvis somerkursaroj en Habere Poche (Francujo), kie instruis Daniel Moirand; San-Francisko (Usono) kun Jim Cool kaj Michel Duc Goninaz; Gresillon – instruis Yvette Vierne; Melburno – tie estis Atilio Orelana Rojas, kaj fine New England. Dum la Adelajdaj somerkursaroj en la 1990aj jaroj mi kutime ne povis studi en la regulaj klasoj, ĉar mi estis okupita pri mia laboro, sed por tamen doni al mi ”lecionojn”, mi gastigadis iun el la ĉeestantaj instruistoj (Katalin Smideliusz, So Gilsu, Trevor Steele, Aleksander Melnikov, Andrzej Grzembowski, Don Broadribb).

**K: Krom la Esperanto-kursaroj vi certe partoprenis ankaŭ aliajn aranĝojn.**

**M:** Mia unua eksterlanda Esperanto-renkontiĝo estis nederlanda-germana junular-kunveno en 1976. Ĝi aparte memorindas, ĉar tie la unuan fojon mi vere devis paroli Esperante kaj la unuan fojon mi konstatis, ke, laŭ iuj, estas peko esti denaska anglalingvano. Mi ĉeestis ferian kunvenon en Belgujo verŝajne en 1994. Ĝis nun mi iris al 4 Universalaj Kongresoj: en Vieno en 1992, en Valencio en 1993, en Adelajdo en 1997 kaj en Vilno en 2005. Mi aparte rememoras la antaŭkongreson en 1992 en Prago, kie mi sentis min kvazaŭ naĝanta en Esperanto, kaj Valencion, kie mi prelegis pri fetoj kaj ultrasono kadre de la Kongresa Universitato.

**K: Se ne kalkuli la ”paŭzojn” vi estis kaj restas aktiva en la loka, adelajda movado, en la jaroj ĉirkaŭ 1992-1995 vi eĉ**

prezidis la lokan klubon kaj kunorganizis la tiean somerkursaron ankaŭ en 2005. Kaj ne estis malmulte, kion vi faris por la sukceso de la Adelajda Universala Kongreso. Provu rememori la plej gravajn el ili.

M: Mi faris dokumentan filmon pri Sudaŭstralio, estris la poŝtan budon, prelegis pri mediproblemoj en Aŭstralio, preparis afiŝojn pri la arĥitekturo de nia urbo, eldonis diskon de aŭstraliaj kantoj *Unu Voĉo*, helpis prepari la Esperantigitan version de la infanlibro *Bib la Koalido*, zorgis pri la preparo de kongresaj afiŝoj, ĉiĉeronis grupon sur Kanguruinsulo, verkis konsilaron pri vojaĝoj.

K: Kaj preparis *Ŝtormidon*.

M: La tradukon en Esperanton faris Trevor Steele.

K: Tiu filmo apartenas al la aŭstraliaj klasikaĵoj kaj Esperanto-versio taŭgas por spektado iam ajn. Kion vi mem ricevis de Esperanto?

M: Per tiu laboro por nia Universala Kongreso mi multon lernis pri mia urbo kaj provinco, kaj por mi la plej ĝuebla parto estis spekti la registradon de *Unu Voĉo*. Mi havas bonajn geamikojn en ĉiuj aŭstraliaj provincoj. Mi faris mian plej eblon por Esperanto en Aŭstralio per la Universala Kongreso, sed estis tamen problemoj ... Nuntempe ege ĉagrenas min la kvereloj ene de la landa organizo. Mi emas kabei, ĉar pro tiu nia malpaco mi ne plu povas varbi ke Esperanto estas lingvo de paco kaj amikeco. Sed mi aldonu, ke nur en Esperantujo mi kantas kaj dancas, kaj mi renkontadas multajn interesajn homojn, kion mi tre ĝuas.

K: Ĉu via familio aprobis vian Esperantistecon?

M: Jes, ili akceptas ĝin kiel mian hobion. Escepte de mia fratino – ĉar ŝi preferas la francan! Laŭ ŝi, Esperanto estas tempoperdo. Por mi estas klare, ke ŝi eraras, tamen mi mem ne konsentas kun la ofte uzata ideo, ke Esperanto helpas lerni aliajn lingvojn. Male, kiam oni vidas la logikecon de Esperanto, oni – almenaŭ certe mi - malpacienas pri la lernado de aliaj lingvoj, kiuj estas tiom multe pli komplikaj.

K: Rakontu iom pri via alia granda hobio: vojaĝado.

M: La unuan fojon mi vojaĝis eksterlanden en 1976, kiam mi pasigis 6 monatojn da ferioj turismante precipe tra norda

Eŭropo. Tre interese estis vojaĝi per la Transsiberia Fervojo. Post 6 monatoj da laboro en akuŝhospitalo de Nottingham (Britujo) sekvis pliaj 3 jaroj da studado en Adelajdo

tio pliaj unu kaj Eŭropo. Tiam mi kaj uzis ĉiun por vojaĝi. Por mi estis granda



bone eblis vajaĝi sen aŭtomobilo! Mi iris eksterlanden por fakaj kongresoj kutime ĉiun duan jaron kaj kombinis la profesion celon kun turismo. Tiel mi vizitis revene el Britujo Fiĝiojn. Sekvis 9 semajnoj sur velŝipo haltante ĉe Pacifikaj Insuloj kiel Vanuatio aŭ Novkaledonio. Alia memorinda viditaĵo estis Peruo, tie Macchu Picchu, survoje hejmen unu semajno sur Insulo Pasko kaj Galapagoj. Esperantistoj vidis multajn el miaj diapozitivoj pri tiuj aventuroj. Kaj ĉar mia pli aĝa fratino loĝas en Usono, mi vizitante ŝin uzis la eblon vidi Yellowstone, Yosemite, Ohio ...

**K:** Alia via ŝatokupo estas kolektado de malnovaj, malnovspeciaj rozoj, tiuj apud vojrandoj, malnovaj tombejoj k.s. Via nuna rozĝardeno estas ege impona. Kaj ne nur ĝi, la tuta ĝardeno plenas de diversspecaj, plej ofte indiĝenaj plantoj. La februara numero de Kanada Esperanto-bulteno 'Inter ni' de 2008 aperigis vian artikolon pri la rozoj kaj inspirite de vi dediĉis la tutan bultenon al la temo: rozoj.

**M:** Mi klopodas krei novajn rozspecojn - ne tre sukcese - kaj helpi la komunumon per kreado de novaj rozĝardenoj el mia kolekto de rozoj.

**K:** Kaj kion pri la verkado? Vi jam aperigis fakajn artikolojn en la angla, en Esperanto mi konas tiun pri via rozkolektado. Ĉu io alia?

**M:** Kelkaj el miaj artikoloj aperis en ESK, en Monato de 1996 estis artikolo pri veprej-incendioj, artikolo en Eurokka Rok-gazeto en 1997 aŭ 1998 pri la evoluo de la KD *Unu Voĉo*, farita por la Adelajda Universala Kongreso (1997). Mi ŝatus verki libron. Ĉar du el miaj gefratoj jam verkis siajn

aŭtobiografiojn, mi ne volas fari same por ne ripeti la jam skribitan pri nia familio. Ankaŭ pri la laboro mi ne volas verki. Mi kredas, ke mi verkas bone, sed mi ankoraŭ ne trovis bonan temon.

**K:** Vi lernis jam la francan, sed restas el ĝi nur legado, ne plu kapablo konversacii. Esperanto, do, estas via sola parolata fremda lingvo, kaj ĝin vi ja regas tre bone. Ĉu vi opinias, ke ĝi iam populariĝos sur tiu ĉi kontinento?

**M:** Mi dubas, ĉu Esperanto iam sukcesos en Aŭstralio, eĉ ĉar ni estas tre multlingva nacio bezonanta komunan lingvon. Tamen, mi vidas klare, ke la angla kiel internacia lingvo ne taŭgas.

*Treege ĝojegis tajloro Hrodeberto, ĉar nun ankaŭ li estis hejmd defendanto. Dum li estis soldato, li estis nenio, same kiel la plej multaj soldatoj, ĉu ne? Sen nun, en la hejmd defendantaro, li estis oficiro. Estis militekzercado, kaj Hrodeberto demandis al la forĝisto kaj bakisto: "Nu, kion vi faros pri la bestoj, kiam venos la malamiko?"*

*Neniu respondo, ĉar la forĝisto kaj bakisto ne sciis kion respondi.*

*"Nu, vi kompreneble brulstampos ilin, kaj sendos ilin en la arbaron!"*

*"Milda ĉielo!" diris la bakisto. "Kompatu min, kiu havas kvardek abelujojn!"*

## Muta ekkrio

Usona kuracisto, d-ro Bernhard Vathason, produktis filmon "Muta ekkrio", kiu prezentas abortigon de 12-semajna homa embrio.

La rigardantoj povas animskue rigardi, pere de ekrano, la dramon spektaklon: la infano evidente klopodas eviti la ĥirurgian instrumenton. Ĝi forkliniĝas, baraktas kaj defendas sin per la manetoj ĝis la momento, kiam ĝi estas murdita, tiam ĝi, en muta ekkrio, malfermas la buŝeton.

La prezidanto de "Movado por la Vivo" en Aŭstrujo, Walter Ramm proklamis: "Kiu vidis tiun filmon estas forte animskuita pro la vivbarakto de la infano en la patrino". Ekzemple la pulso de la infano dum la mortigo altiĝas de 140 ĝis 200 korbatoj dumminute.

La filmdokumento estas konsiderata unu el la plej akraj argumentoj kontraŭ intenca abortigo kaj laŭ opinioj

de la "Movado por la Vivio" ĝi montras kiel la publiko estas trompata koncerne la okazaĵojn dum la mortigo.

*František Nosek*

*Post fermiĝo de la drinkejo iris hejmen en la nokto du drinkintoj. Ili venis al rivero kaj ekdiskutis, kiel plej sekure transiri ĝin. Fine unu el ili diris: "Se mi ekfunkciigos mian poŝlanternon, vi povos transiri laŭ la lumradio."*

*Respondas la alia ebriulo: "Ne, tiom freneza mi ne estas. Kiam mi estos en la mezo de la rivero, vi malfunkciigos la poŝlanternon, kaj mi dronos."*

## **Fruktodona kongreso por Esperantista eldonejo**

La ĵus finiĝinta 44a Brazila Kongreso de Esperanto estis fruktodona por Eldonejo Lorenz.

La budo de la entrepreno estis inter la plej vizitataj. La institucio lanĉis la librojn "O Homem que Sabia Demais" kaj Romance de Zamenhof", ambaŭ verkitaj de José Carlos Leal, krom "Mi estas spirito", de Márcia de Castro Soares, kaj la "Almanako Lorenz 2009". La firmo kunordigis la kunsidon omaĝe al la centjariĝo de la Esperanta agado de Brazila Spiritisma Federacio. Eldonejo Lorenz firmiĝas kiel unu el la plej agemaj eldonantoj de libroj en kaj pri Esperanto en la tuta mondo.

*El Libera Folio*

*Maljuniĝis Malpur la ĉifonisto kaj eklaboris en la turisthotelo kiel manĝilarlavanto. Treege malfacile kontentigebla sinjorino el iu fremda lando, certe ne Aŭstralio, laŭtege plendis al li pri lia laboro. Pacience li iom da tempo aŭskultis, aŭ eble nur aŭdetis. Tiam li ekkriis: "Iru Infernen!"*

*Kompreneble la sinjorino plendegis al la turisthoteldirektoro, kiu ordonis al Malpur, ke li iru peti la pardonon de la nobla sinjorino. Malpur trenis siajn piedojn en la manĝosalonon, kie la gastoj sidis manĝante, fakte ili tagmanĝis. Li kriis rekte al la sinjorino dirante: "Oni petis min diri, ke la vojaĝo estas nuligita...!"*



